RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
22/05/2020 09:01:58

Usono anoncas retiriĝon de la traktato de malfermaj ĉieloj

Moskvo, maj 22 (RHK) La ministerio pri eksteraj aferoj de Rusio ricevis oficialan noton de la usona ambasadejo pri la procezo por eliro de Usono de la traktato de malfermaj ĉieloj, laŭ deklaris la vicministro rusa Serguéi Riabkov.

Krome, la ministerio asertis ke Rusio konfirmas sian devon kun la traktato kaj promesas ĝin konservi.

La usona prezidento, Donald Trump anoncis antaŭe ke Vaŝingtono retiriĝos de la traktato kaj ne plu plenumos ĝin ĝis Rusio “plenumi siajn devojn.”

La retiriĝo de Vaŝingtono kompletiĝos ene de ses monatoj, kvankam Trump esprimis ke tio povus ne okazi se Moskvo ekplenumas ĝin. Dume, Rusio firme rifuzis la akuzojn de Usono.

La traktato de malfermaj ĉieloj subskribita en 1992 en Helsinko, ebligas al militaj observantoj efektivigi flugojn senarmitajn por aera gvatado kun la celo havi bildojn de trupmoviĝoj kaj ŝipoj en vasta teritorio el la kanada urbo Vankuvero ĝis la haveno de Vladivostoko, en la fora oriento rusa.

Tiu dokumento valida ekde 2002, havas hodiaŭ 34 subskribintojn, inkluzive de Rusio, kiu ratifis ĝin en majo de 2001, laŭ raportis la gazeto Sputnik.